

UN: 17 Celoj de Daŭripova Evolu(ig)o, 2015 - 2030

Celo 1. Fini malricecon en ĉiuj siaj formoj -- ĉie.

Celo 2. Fini malsaton, atingi certecon pri nutraĵoj kaj plibonigita nutrado kaj promocii daŭripovan agrikulturon.

Celo 3. Certigi sanajn vivojn kaj promocii bonfarton por ĉiuj je ĉiu aĝo.

Celo 4. Certigi inkludan kaj bonkvalitan edukadon kaj promocii dum-vivajn lerneblojn por ĉiuj.

Celo 5. Atingi gendran egalecon kaj socian fortigadon por ĉiuj virinoj kaj knabinoj.

Celo 6. Provizi salubran akvon kaj sanitarajn servojn por ĉiuj.

Celo 7. Certigi alireblon al pagebla, fidinda, daŭripova kaj moderna energio por ĉiuj.

Celo 8. Promocii inkludan kaj daŭripovan ekonomian kreskadon, kaj dignan laboron por ĉiuj.

Celo 9. Konstrui resiliencan infrastrukturon, promocii inkludan kaj daŭripovan industriigon kaj progresigi novigadon.

Celo 10. Redukti neegalecon ene de landoj kaj inter la nacioj.

Celo 11. Fari urbojn kaj homajn setlejojn inkludaj, sekuraj, resiliencaj kaj daŭripovaj.

Celo 12. Certigi daŭripovajn manierojn de konsumado kaj produktado.

Celo 13. Fari urĝajn paŝojn por kontraŭbatali klimatoŝanĝiĝon kaj ties malbonefikojn. (*)

Celo 14. Konservadi kaj daŭripove uzi la oceanojn, marojn kaj marajn resursojn por daŭripova evoluo.

Celo 15. Protekti, restaŭri kaj promocii daŭripovan uzadon de teraj ekosistemoj, daŭripove mastrumi arbarojn, kontraŭbatali dezertiĝadon kaj inversigi difektojn je la grundoj kaj protekti biodiversecon.

Celo 16. Promocii pacemajn kaj inkludemajn sociojn cele daŭripovan evoluon, provizii alireblon al justeco por ĉiuj kaj establi efikajn, responsajn kaj inkludajn instituciojn je ĉiuj niveloj.

Celo 17. Fortigi la rimedojn por efektividadoj kaj revitaligi la tuttergloban partnerecon por daŭripova evoluo*.

*) Komentoj: Agnoskante, ke la "Kadra Konvencio de la Unuiĝintaj Nacioj pri Klimatoŝanĝiĝo" estas la unuaranga internacia interregistara forumo por intertrakti la tergloban respondon al la klimatoŝanĝiĝo.

Evolu(ig)o: Evoluado estas la ne-transitiva sekvo de la homa agado (mw).

2015.08.18 Elangligis AVE (WG)

el la originala teksto sub ><https://sustainabledevelopment.un.org><.